laŭ tio kiom mi konas lin, li estas honestulo la afero interesas min nur tiom, kiom ĝi tuŝas miajn projektojn (nur ĝis la punkto, kie)

### 248. Gegensatz:

ich grabe im Garten, während (wohingegen) du in der Sonne liegst

du schaust zum Fenster hinaus, anstatt daß du deine Aufgabe lernst

### 249. Einräumung:

er kam zu spät, obwohl (obgleich, wenngleich, ob schon, wiewohl) er sich sehr beeilte

wenn er auch viel weiß, so weiß er doch nicht alles

auch wenn (selbst wenn) er nicht krank wäre, käme er trotzdem nicht

du irrst, so sehr du es auch bestreitest

mag es früh sein (sei es früh) oder spät, er ist immer gleich freundlich

sei es daß er zu mir kommt, sei es daß (oder daß) ich zu ihm komme, jedenfalls werden wir die Sache gründlich besprechen

mi fosas en la ĝardeno, dum ke vi kuŝas en la suno (dum allein ist Verhältniswort!)

vi rigardas el la fenestro, anstataŭ ke vi lernas vian lecionon (oder verkürzt: anstataŭ lerni...)

li venis tro malfrue, kvankam (a) li multe rapidis

malgraŭ ke li scias multon, li scias tamen ne ĉion

eĉ se li ne estus malsana li tamen ne venus

vi eraras, kiom (b) ajn vi kontraŭdiras tion

ĉu (d) frue, ĉu malfrue, li ĉiam estas same afabla

ĉu li venas al mi, ĉu (aŭ) mi al li, ĉiukaze ni preparolos zorge la aferon

## Ein Lehrbuch, das Ihnen und Ihren Schülern Erfolg bringt

Hans Koch

### Espéranto-Schnell-Kurs

DM 1.— und 10 Pfg. Zustellkosten

Verlag Esperanto-Kurier — (16) Offenbach (M)

### 3. Bemerkungen

31. Die Bw haben im E keinen Einfluß auf die Aussageweise des Zeitwortes (Wirklichkeits-, Wunsch-, Befehls- oder Bedingungsform); diese wird ausschließlich durch den Sinn des Satzes bedingt: ich vermute, daß er soeben kommt — mi supozas, ke li ĵus venas; er schrieb mir, daß er kommt — li skribis al mi, ke li venos; ich bat ihn, daß er komme — mi petis lin, ke li venu; ich glaube, daß er käme, wenn er könnte — mi kredas, ke li venus, se li povus.

32. Im D können einige Bindewörter ausgelassen werden, was aber eine Umstellung der Wortfolge erheischt. Bei der Uebersetzung ist daher sehr darauf zu achten, daß solche Sätze richtig erkannt werden.

Es kommt vor der

321. Ausfall von „daß“ bei Ergänzungs- und Bedingungssätzen (22, 23): ich verlor die Hoffnung, du würdest kommen — mi perdis la esperon, ke vi venos; er glaubte, ich sei krank — li supozis, ke mi estas malsana; ich bat ihn, er möchte mich besuchen — mi petis lin, ke li vizitu min.

322. Ausfall von „wenn“ bei Bedingungssätzen (247); das zuweilen gebrauchte „so“ oder „dann“ wird nicht übersetzt: hätte ich Zeit, würde ich dich besuchen — se mi havus tempon, mi vizitus vin; verträgst du uns, dann werden wir uns rächen — se vi perfidas nin, ni venĝos nin.

323. Ausfall von „obwohl, wenn auch“ bei Einräumungssätzen (249); die bekräftigenden Uw „auch, gleich“ werden besser nicht übersetzt: weiß er auch viel, alles weiß er doch nicht — malgraŭ ke li scias multon, ĉion li tamen ne scias; beeilte er sich gleich sehr, er kam doch zu spät — kvankam li multe rapidis, li tamen venis tro malfrue.

33. Nach den Zeitwörtern des Glaubens, Meinens, Sagens usw. ist im Gegensatz zum D die abhängige Bejahung oder Verneinung mit „ke“ zu verbinden: War der Briefträger schon da? — Ich denke schon (= ja); ich glaube nicht — Ĉu la leterportisto jam venis? — Mi supozas, ke jes; ..., ke ne.

Unter bestimmten Voraussetzungen können Nebensätze mittels der Nennform verkürzt werden unter Wegfall des Bindewortes. Dieses Kapitel ist einer besonderen Betrachtung vorbehalten.

## Flustro al la oreloj de virino

Ĉiu virino estas malgranda heroino de l'ĉiutago; sed pri ŝia heroeo oni ne parolas cetere.

Virinoj majstras malfacilaĵojn, kiujn viro neniam kapablas venki.

La laborkapablon de virino superas nur tio: ŝia tolerkapablo.

Taksi virinon ĝuste, la intelekto sola sukcesos neniam. Oni devas konsulti nepre la koron.

Por multo, kion virino faras utkompreneble, la viroj same tutkompreneble havas nenian parolon de aprobo.

La rolo de virino en la ekonomia vivo ofte prezentigas ne sur la scenejo, sed malantaŭ la kulisoj.

Dank' al sia adaptiĝemo la virino kutimiĝas pli bone al la vivo de viro, ol viro al tiu de virino.

# Sorto de Reĝino

Ni volas nunfoje observi termiton, kiu — elfluginte — surteriĝis en la herbaro. Unue ŝi forĵetas siajn flugilojn. En tio ŝi sukcesas per fulmeca movo. Ĝus ni vidas ŝin ankoraŭ kun sendifektaj flugiloj, en tujposta momento ŝi forrampas kaj ŝiaj kvar flugiloj kuŝas en la herbejo; ŝi estas multe, multe pli rapida ol virino demetanta sian vesperan vestaĵon. Forĵetinte la flugilojn dum kelkaj sekundoj, la termito tuj kuras rapide tien kaj tien. Evidente ŝi celas trovi konvenan lokon por iu nova intenco. Tuj kiam ŝi estas trovinta taŭgan lokon, ŝi faras agon tre kuriozan: ŝi apogas sin sur siaj antaŭpiedoj kaj suprenlevas aeren tri kvaronojn de sia malantaŭa korpo. En tiu ĉi pozo ŝi restas tute trankvila. Ŝi fervore okupas sin, sendi sendratan SOS-vokon en la eteron. La speco de tiu ĉi signalo troviĝas tut'en-tute trans la sfero de niaj sentoj kaj tamen la virmito rimarkas tion trans nekredablajn distancojn.

Nia ino estas kiel tre moderna juna virino ne tro hezitema, por fari la unuan paŝon en la amo; se vi atendas sufiĉe longe, vi vidos subite la virmiton afluganta tra la aero. Kvankam lia flugo aspektas nelerta kaj eĉ sencela, vi tamen rimarkos, ke li kapablas cel-flugi kaj povas teni la direkton elektitan eĉ kontraŭ la vento.

Alteriĝinte li faras la saman movon fulmeca, kiun ni observis ĉe la ino, kaj jam ankaŭ liaj flugiloj kuŝas sur la tero. En terura kaj senrezista rapidemo li nun rampas tra la herbaro. Li serĉas la sendinton de la signalo, kiun li rivevis altsupre en la aero. Post malmultaj minutoj li trovis ŝin. Dum la tuta tempo la ino estis senmove staranta, sed en la momento, kiam la vireto tuŝas ŝin, ŝi estas instigata per lia eksciteco. La ino forkuras tiel rapide, kiel ŝiaj gamboj kapablas porti ŝin, kaj la vireto tuj sekvas. Ili nun ekserĉas definitive novan hejmon kaj ĉe tio la vireto lasas la gvidadon al sia edzino.

Ili estas la gereĝoj, de kiuj devenas la tuta tribo. Komence ili devas men zorgi por la nutrado kaj vartado de la unue-naskitoj; sed tuj kiam la plej aĝaj infanoj estas plenkreskintaj, ili surprenas ĉiun laboron por la komunumo. Intertempe la reĝino pli kaj pli grandiĝas kaj dikigiĝas preskaŭ pohore. Ŝia malgranda gracia korpo malaperas en videble kreskanta grasaĵo, ĝis kiam ŝi fine fariĝis nebela grassako vermosimila. Kaj — por kompletigi la malfeliĉon: sinjoro la edzo, kiu ĝuas la plezuron de dolĉa mallaboro

alikaze preskaŭ ne donacita de la naturo, krom tio ŝajnas esti eltrovinta la misteron de ĉiama juneco. Li restas same bela, vigla kaj juna, kiel li estis dum sia edziĝa flugo. Sed rigardante ŝin, oni malfacile kredas, ke ŝi iam ŝvebflugis per elflugiloj tra la aero. Pro tio ni apenaŭ havus kaŭzon, riproĉi al lia moŝto, se li okulus al malpli naŭza ina estaĵo. Se oni malkovras la subteran loĝejon de la reĝino, la ĝeno ja konfuzaŝ lin; oni vidos lin erarvaganta, sed ĉiam revenanta al ŝia flanko. Li ne ekpensas, fugante

La tuta tero, per tio elĵetita, estas transportata supren kaj uzata por formi dikajn defendkruston. En ĉi tiu kavaĵo ili loĝigas la reĝinon. Ĝi estas farita kvazaŭ laumezure, tiel ke oni povus kredi, ke ĝi estas konstruita ĉirkaŭ ŝi. Neniu homa okulo iam ajn vidis, kio okazas efektive tie ĉi, neniu trovis eblon, observi la termitojn dum la konstruado de la reĝina palaco, ĉar ili laboras en malhelego. Se oni enigus lumon en ilian konstruaĵon, tio signifus por ili la saman katastrofon, kiel por ni la subita detruo de la suno.

La reĝino senĉese kreskas, ĝis kiam ŝi fariĝis nemoŝebla maso, kiu kuŝas tie kiel bloko. Nur ŝia malgranda kapo vidigas ankoraŭ signon de vivo; ĝi sola tute ne aliĝas.

La substanco, el kiu ŝia unua palaco ĉelforma estas konstruita, baldaŭ malmoliĝas kiel cemento. Kutime la ĉelo havas la ĝustan mezuron por la reĝino; ĉiukaze la reĝino estas ĉiam tro granda por tio, ke ŝi povus uzi la pordon por en-kaj eliri.

Fine venas la momento, kiam ŝi prekaŭ plenigas la disponeblan spacon en la ĉelo. La etaj laboristoj havas apenaŭ lokon, por transporti la ovojn trans la sensentan graskoloson. Terura tragedio ŝajnas esti okazonta. Sed la termitoj evidente neniam maltrankviliĝas pro tio. Antaŭ kiam ŝia moŝto plenigas definitive la ĉelon, ili konstruas duan, kiu estas je duono pli granda ol la unua. Ĝi situas paralele kun ĝi, muro ĉemuro kaj estas same masiva. Kaj nun la termitoj sukcesas, forigi la reĝinon el ŝia ĉelo kaj transporti ŝin en la duan. Tiu ĉi ĉelŝanĝo okazas ankoraŭ plurfoje, ĝis kiam la reĝino post ĉirkaŭe ses transloĝigoj alvenis en la lasta kaj plej granda ĉelo. Dum la pli postaj fazoj estus necesaj por levi ŝin je miloj pli multe da termitoj, ol loko estas por ekpreni la korpon. La reĝino ne povas movi sin mem. La ĉelpordoj estas tro mallargaj por ebligi trairon. La aliaj termitoj ne kapablas levi ŝin. Kaj tamen ŝi malaperas el la unua ĉelo kaj reaperas en la alia. Oni povas marki la reĝinon kaj pruvi per tio, ke ŝi ĉiam estas la sama, kiu el la unua ĉelo atingas la alian ĉelon.

Por la ĉion superanta signifo, kiun la reĝino havas por la termitoŝtato, ŝi devas toleri gravajn oferojn. Oni povus imagi, ke la naturo, post kiam la mallonga edziniĝa flugo estas okazinta, parolus al ŝi jene:

(fino sur paĝo 12)

## Bollmann

Ce la lago estas loko,  
Kie Bollmann laŭ inklin'  
Fiŝojn kaptis per la hoko,  
Tio tre amuzis lin.  
Bedaŭrinde iun tagon  
Falis li ĉe tiu sport'  
En la malsekegan lagon,  
Tio estis lia mort'.  
Alveninte en la domo  
De l' ĉielo diris li:  
„Bollmann estas mia nomo  
Kaj razisto estas mi“.  
„Jes, por vi ni lokon trovos“,  
Ridis Petro kun favor',  
„Kaj vi tuj min razi povos,  
Por ne esti sen labor“.  
Bollmann Petron do ekrazis,  
Sed, ho, kiam la tortur'  
De ĉi tiu far' okazis,  
Kriis Petro pro terur':  
„Mil diabloj! Bollmann, ĉu ĉi  
Tion razi nomas vi?  
Mi ĉi tion nomas buĉi.  
Tuj forigu vin de mi!  
Malaperu! Kaj sur-tere  
Gratu plu! Post tiu ĉi  
Prov' de via pov' prefere  
Kresku pleno-barb' al mi.“

De Karl Vanselow  
el „Nia Lingvo Esperanto“

savi sian propran vivon. Li kroĉas sin al ŝia grandega korpo kaj provas defendi ĝin; li eĉ oferas sian vivon ĉe ŝia flanko, se eble la atakinto celas tion.

Ofte ni nomas reĝinon patrino de ŝia popolo. La reĝino de la termitoj estas tiu laŭvorte. Ŝi estas la sola patrino de ĉiuj milionoj, kiuj formas ŝian komunumon; ĉiu unuopa estaĵo estas naskita de ŝi. Oni atendas nenion alian de ŝi, ol liveri la seninterrompan fluon de ovo, ĉar la ĉiutaga perdo je laboristoj kaj soldatoj estas tre granda malgraŭ la bonegaj aranĝoj por defendo.

La unuaj laboristoj komencas antaŭ ĉio konstrui palacon por la reĝino. Ĉirkaŭe unu ĝis unu kaj duona metro sub la tersupraĵo ili elfosas kaverneton, kiun ili en laboroj plurjaraj pligrandigas iom post iom.



# La 38-a invitas vin al Zagreb

Speciale verkita por „Esperanto-Kurier“ de Emilija Lappena, UEA-Ĉefdelegito por Jugoslavio

Oni kongresas ĉiuflanke. Ene de la naciaj kaj internaciaj kadroj. Iam la historio konis nur la kongresojn de politikaj partioj kaj la ekleziajn. Nun ĉiu faka branĉo, scienca kaj artista unuigo plej diversaj sektoroj kaj sennombraj ideo- logiaj movadoj kongresas. Ne mirige ke ankaŭ esperantistaj. La diferenco inter la esperantistaj kaj ĉiuj aliaj kongreso estas, ke ni kongresas jam preskaŭ 50 jarojn kaj estas la solaj kongresanoj posendantaj eblecon senpere, rekte, sen helpo de tradukantoj kaj tradukiloj paroli, diskuti kaj disputi. Kaj ĝuste pro tiu celo la historio kreis kongresojn. Kiam la ekleziaj gvidantoj de la diversaj ŝtatoj antaŭ jarcentoj kongresis ili havis sian komunan kongreslingvon — la latinan. Ili ne bezonis tradukistojn. Certe iam venos tempo kiam niaj nepoj miros pro la ekzisto de tiom multnombraj internaciaj kongresoj kie la kongresanoj ne sciis paroli unu kun la alia, aŭskultis nekompreneble oratorojn kaj en la diskuto pretaj respondi, devis unue pere de tradukisto pretigi la respondon!

Tute alia etoso regas dum niaj kongresoj! Tridek sep da ili estas ĝis nun dum preskaŭ kvindek jaroj. Multe, tamen ne en ĉiu jaro. Ni scias kio kaŭzis la rompon de la ĉiujara kongres-kontinueco. La unua kaj la dua mondmilitoj. La kanonoj de la unua baris la vojon de niaj kongresantoj al la ĉiujara kongreso; la aviadilaj bomboj de la dua malhelpis ilin la duan fojon. Ĉu la potenco de la atombombo la trian fojon rompos la kontinuecon de niaj kongresoj? Ni esperu ke ne. Ni esperu ke Esperanto funvenkos antaŭ ol la atombombo puŝos la homaron en novan sanglavangon.

Tridek sep esperantistaj kongresoj okazis jam en diversaj lokoj, en diversaj mondpartoj, plejparte en la okcidenta Eŭropo, sed eĉ ne unu sur la balkana duoninsulo. Fine la 38-a decidiĝis veni en tiun ĉi Eŭropoparton. Ĉu la kongresanoj timos la „sovaĝajn balkanojn“? Ĉu ili atendas trovi post ĉiu arbusto pafilon? Ĉe ĉiu knabino ponardon? Ne timu la pafilon kaj ponardojn; ili kvietas kaj rustiĝas por amikoj. Jes, la jugoslaviaj popoloj sangis dum jarcentoj en senĉesaj bataloj kaj militoj, sed ĉiam nur defendante siajn domojn milfoje ĝis fundamento bruligitaj kaj siajn familianojn kruele buĉitajn... neniam atakante iun aj de siaj najbaroj. Por amikoj afablon, jes ankaŭ por estintaj malamikoj kiuj post la finita batalo venas honeste kaj amike al ni. Venu, vi konvinkiĝos mem!

Vi certe atendas ion apartan de la movado, kiu preparas por vi la

38-an Universalan Kongreson en Zagreb. Ne estu tro postulema. La enlandaj esperantistaj movadoj pro la fortaj centraj organizaĵoj direktantaj ilin fariĝas jam tre similaj unu al la alia. Eble tamen io estas speciala. La plimulto de niaj esperantistoj estas junaj. Junaj studentoj, oficistoj, laboristoj kaj fakuloj troviĝas en la komitatoj de ĉiu esperantista organizaĵo. Ankaŭ en la L. K. K. Ĝia prezidanto, juna doktoro de medicino, atingis apenaŭ la tridekan jaron! Junuloj atendas vin ĉe elavagoniĝo, junuloj gvidos vin tra la urbo, junuloj montros al vi la vidindaĵojn de Zagreb. Venu, konvinkiĝu mem!

Ankoraŭ io karakteriza atendas vin en Zagreb. La politika reĝimo reganta en Jugoslavio, malsimpa-

tia al multaj homoj. Ne timu! La domoj en Zagreb staras firme sur la fundamentoj, ne sur tegmentoj. La vagonaroj estas tirataj de lokomotivoj fiksitaj al la unua, ne al la lasta vagono. En Zagreb ekzistas multaj hoteloj, kafejoj, restoracioj kaj danclokoj. Laŭ aspekto samaj kiel en ĉiu alia urbo. Nur ion ili ne havas: la privatan proprajulon. Ili estas propraĵo de la ŝtato. Sed kredu, ke en la sonoj de la valsomuziko oni ne sentas tiun fakton. Dancante tangon kaj sambon vi ankaŭ ne sentos tiun fakton. Kredu! Venu, vi konvinkiĝos mem.

La „sovaĝa“ balkana lando streĉas la fortojn de siaj plej bonaj esperantistoj por fari al vi agrablan restadon en Zagreb dum nia 38-a!

## Lipkoloriloj

### ESTAS AFERO DE KONFIDO

Herezaĵo skribita de viro

La lipkolorilo estas ja — simbole dirite — la lazo, per kiu la virinoj intencas kapti la korojn de la viroj. Pro tio oni povas diri malmulton kontraŭ la lipkoloriloj — la celo pravigas la lipkolorilojn.

Sed — ekzistas ne nur unu lipkolorilo, ekzistas tutaj serioj de ĉiuj nuancoj, kun ĉiaj garnajoj, por ĉiuj okazoj. Kia vasta kampo! La vendistinoj de lipkoloriloj — kiom da spertoj ili do devas havi, sciencan pri koloroj, psikologion, modon kaj kion ajn krome — kion mi ne scias.

Jen estas lipkoloriloj por la antaŭtagmezo; la nuancoj deĉe aplikitaj — antaŭtagmeze oni ja ne ekkontaktu. Por la posttagmezo oni uzas jam pli intensajn nuancojn. La akra sunlumo! Kaj cetere. Sed por la vespero — nuancon malhelegan kaj misteran, multpromesan. Optika opio — ha!

Nenion kontraŭ kiskonstantaj lipkoloriloj! Kiu deziras, tiu faru. Kaj kiu faris, tiu havu. Respektive kiu jam estas edzo, tiu mem kulpas. Malgraŭ ĉio, kiom ajn kisebla estas tia lipkolorilo — la sinjorino devas ĉiam renovigi. Sekve lipkolorilo eble tamen ne povas esti tiel rezistema. Aŭ ĉu jes? Aŭ kiel?

Malfacila — la elekto de ĝusta lipkolorilo! Ĝi devas konveni por kio ajn — mi ne scias. Por la harkoloro. Por la okuloj. Por la subtenilo de platpiedoj. Por io ajn.

Cetere ĉu anstataŭ la lipkoloriloj, havigotaj ĉiam denove, oni ne povus kolori la lipojn per daŭrema olelako? Kiel korelativo por la ĉiamaj harondoj, por tiel diri: krei daŭrolipojn? Eble ŝprucigitaj per nitro-aŭtolako?

Ĉu eble ekzistas — mi ne scias — ankaŭ lipkoloriloj kun diversaj bongustoj? Tio do estus furo-raĵo! Lipkoloriloj kun frambo-gusto por ŝatantoj de dolĉaĵoj. Mi mem ja preferus lipkolorilojn kiuj gustas je kuirita ŝinko. Mi estas eble iom neideala — sed certe ankaŭ multaj aliaj viroj. Ĉiukaze mi imagas belega tian frustradon dum lunbrila nokto sub siringarbo: „Ho karulino, vi gustas tiel bonege je bifstekoj!“ Tio do — mi kredeble povas rajte aserti — estos foje io tute alia. Io aparta.

Cetere — nu, ĉu eble unueca lipkolorilo estus la plej utila? Por ke fine ĉesu la ĉiam rea blekado: „Fiulo, vi trompis min. La makuloj en via naztuko devenas tute ne de mia lipkolorilo!“

Kelkfoje lipkoloriloj estas uzataj ankaŭ kiel skribiloj. Tiam oni povas legi ekzemple specialan amsaluton per lipkolorilo pentritan sur papera buŝtuko: „Mi estas en la kinemo. Malvarma kafa sur la forno. Saluton Sabino.“

Per tiu ĉi konciza frazo, malantaŭ kiu — ĉu oni povas scii? — eble jam minacas proksimiĝanta familia katastrofo, ni finu tiun ĉi delikatan temon kun deca seriozezo.

# Konsiloj por eleganteco

La akcesoraĵoj destinas la elegantan noton. Nenia vestaĵo, kiom ajn bela ĝi estas, efikas elegante, se la ĉapelo estas malbone elektita, se la gantoj kaj la ŝuoj ne estas en ordo aŭ ne konvenaj; kontraŭe vestaĵo kun bone elektita akcesoraĵo povas havi efikon, kian ĝi sola ne havus.

Tial ke la speco de la akcesoraĵo havas tian signifon, ĝi estu elektita tre zorgeme. Ĝi ne toleras ekstravagancojn; ŝuoj kaj gantoj estu tre simplaj, por efiki elegante. Per ia frapanta ornamaĵo direkti la atenton al la piedoj aŭ al la manoj, estas ĉiam ordinare.

Nenio estas pli eleganta ol glata ganto el mola ledo kaj de bona kvalito, kies koloro konformas harmonie al la tuta aspekto de la portantino. Similaj estas la kondiĉoj rilate al la ŝuoj. Ĉiam ili estu simplaj. Sole la ŝuo por la vespero povas havi iom specialan noton.

Sed tio estas permesata nur al virinoj kun tre memcerta gusto. La aliaj agas pli bone, preferante pli simplan formon.

Manoj kaj piedoj ne estu enpremitaj. Gantoj kaj ŝuoj devas estis adaptaj. La ŝuo donu al la piedo forton, sekuron, ĉarmon kaj eleganton.

La mansaketo postulas antaŭ ĉio kvaliton. Per la speco de la ledo kaj de la fermilo ĝi efiku flegita kaj praktika. La interno estu same eleganta kiel la ekstero. Ĉiuj necesajoj malgrandaj estu en ĝi kaj ankaŭ ordo, ne ĥaoso kiel post tertremo. La mansaketo estu laŭmoda, ne frapanta. Ĝia valoro baziĝu sur la materialo.

Suoj, gantoj kaj mansaketo konvenu kompreneble unu al la alia. Almenaŭ du el ili estu similaj, sed se la tria estas alispeca, ĝi tamen efiku ankoraŭ modeste.

## Viroj devas esti tiaj!

En la akvoj de la banujo la homo estiĝas kiel je la unua tago de mondkreado: vigla, fortigita, bonhumora kaj novnaskita. Multaj edzinoj pretigas la banon por sia edzo kun amema zorgo — ne nur pro la pureco, sed ĉar nur tiamaniere ili povas esti certaj, havi poste modelan edzon.

Malofte la „infano en la viro“ evidentiĝas tiel klare kiel ĝuste en la banujo. Tiu ĉi fakto estas krome akcelata per la certeco, ke oni estas sola, ke neniu povas eniri kaj fari kritikajn rimarkigojn. Oni ludas plezure submarboaton per la sapo, movas facile la piedfingrojn kaj ĝojas, ke oni posedas dekon da ili. Oni klakbatas, ŝprucigas kaj plaŭdigas la akvon, gruntas agrable kiel rosmaro kaj subite ekkantas, ke tenorkantisto povus paliĝi pro envio. Banĉambretoj estas malgrandaj, izolaj, kahelitaj kaj neplenaj kaj sekve prezentas la kondiĉon por belega resonado. Estas permesate, kanti ĉion, ĉar neniu ĉeestas, kiu povus malpermesi tion.

Sed kio okazas efektive en la banujo, kiam la familia sinjoro banas, tion scias nur li sola. Tio estas unu el la plej belaj sekretoj, kiun viro povas gardi. En nia banejo de multaj jaroj pendis malgranda blanka ŝranketo. Ĝi estis ĉiam ŝlosita, kaj eĉ ne mia patrino sciis ĝian enhavon. Mia patro diris ĉiam tre bruske, ke ĝi enhavas lavilaron por persona uzo. Kelkfoje li murmuretis ankaŭ ion pri domapotekujo. Sed iun tagon teruraĵo okazis: Mia patro estis irinta en la negoce-

jon kaj lasinta la ŝlosilon en la ŝranketo. La proverba scivolo de la ĉarma ina karaktero rigore postulis sian rajton. Delikate, tre singarde mia patrino malŝlosis la ŝranketon kaj — komprenema rideto glitis tra ŝia vizaĝo. Nete ordigitaj tie staris submarboato, oceana vaporsĥipo, velŝipo, versĥipo, ŝarĝboato kaj — celuloida anaso...!

La vesperon mia patro retrovis la ŝlosilon en la poŝo de sia veŝto kaj nur ridetis pri tio, ke li kredis, esti lasinta ĝin en la ŝranketo.

Tiun vesperon la bano daŭris ekstre longan tempon!

Trad. H. K.-Mchn



„Kelnero, bonvolu alporti cindrujon por sinjoro Lageto!“

## La morto de Knigge

Ni dankas al Petro Bamm la ĉerman anekdoton pri la morto de la germana barono Knigge, kiu ŝuldas sian bonfamondum pluraj jarcentoj al sia libro „Konduto inter homoj“. Petro Bamm rakontas:

Barono de Knigge, dediĉinte sian vivon al la instruo kiel uzi tranĉilon kaj forkon, foje vojaĝis Ĉinuĵon, por studi tie la uzon de la mangostangetoj. En la Ruĝa Maro, pro la varmeĝo laciginte, li falis en la akvon. Neniu rimarkis tion. Dum iom da tempo li naĝis tien kaj tien en la sala fluidaĵo, kiam li ekvidis ŝarkon sin direktantan al li. Decideme, defendi sin ĝis neebleco, li eligis el sia poŝo tranĉilon, kiun malfermi li sukcesis kun iom da peno. Sed la ŝarko rigardis lin mirigite kaj diris: „Ho, sinjoro de Knigge, fiŝon per tranĉilo!“ Pro kio al sinjoro de Knigge restis nenio alia, ol lasi la tranĉilon fali kaj sin engluti sen kontraŭstaro.

### Ĉu kafo aŭ teo?

La germana aŭtoro Teodoro Fontane kiel fraŭlo — estante tiam ankoraŭ apotekisto — ekluis novan ĉambron meblitan. La unuan matenon post la matenmanĝo li diris ĝentile ridetante al la mastrino: „Sinjorino, se tio, kion vi servis ĉi tiun matenon, estis kafo, mi deziras teon ekde morgaŭ; sed se tio estis teo, mi petas vin ekde nun servi kafon!“

### Neparolemo

Maljuna maristo veturas per la fervojo. Dum la vojaĝo sinjoro eniras en la vagonon kun siaj specimenaj kofroj, salutas ĝentile kaj demandas: „Nu, kien vi veturas?“ — La maristo ne respondas. „Esperable la bela vetero estos konstanta!“ diras la sinjoro. La ŝipisto eĉ ne tusetas. Tiu versajne ne komprenas la germanan lingvon, pensas la vojaĝanto kaj demandas: „Do you speak english?“ Kaj kiam ankaŭ ĉi tio nenion efikas, li provas krome alparolon france kaj holande.

Nun la maljuna honesta maristo elkraĉas sian maĉtabakon kaj diras: „Ne klopodu, mi estas eskimo!“

### Oni ne povas fari ĉion

Kamparano veturanta en tramvagono kraĉis jam plurfoje sur la plankon. La konduktoro: „Ĉu vi ne scias legi? Ĉi tie estas skribite grande kaj klare: Ne kraĉu en la vagonon!“ — La kamparano: „Oni ne povas fari ĉion, kio estas tie skribita. Tie oni legas: Portu mamlevilon! Ĉu vi portas mamlevilon?“

### Suldoj

Kiam la ekzekuciisto venis al la dramisto Frank Wedekind, la poeto diris ĝentile: „Prenu tiun ĉi sidlokton! Tio estas la sola, kion vi povas preni tie ĉi!“

# Venĝo de teatroŝervisto

Jus mi estis elirinta el la trajno, staris ankoraŭ kun la kofroj en la manoj. Jen oni jam atakis min.

— Ĉu vi jam havas enirbileton?  
— Por kio?

— Por la sensacia unua prezentado hodiaŭ vespere.

— Ĉu nova teatraĵo?

— Origina prezentado. Angla aŭtoro. Pli bona ol Wallace.

— Do kriminalaĵo!

— La plej kurioza kaj alloga kriminalaĵo de ĉiuj tempoj. Grandioza rolokupo. La plej eminentaj aktoroj. Fama gastreĝisoro. La unua prezentado estas forĉetita jam de semajnoj.

— Kaj la titolo?

— La muro en la Parkstrato.

— Tio promesas multon.

— Tio signifas nenion. Sed tio, kio disaŭdiĝis kaj pro kio la tuta urbo febras: ĝis la fino neniu divenas, kiu estas la murdinto. Nur mallonge antaŭ kiam la kurteno malleviĝas, post tri horoj da senspira atento — cetero rezultas laŭdire kurioza surprizo — oni ekscias tion.

Mi ŝatas kriminalaĵojn. Mi ege ŝatas ilin. Mi insidas la farinton de post la unua minuto. Por mi ne forglitas suspekta parolo, nek kaŝita naiveco. Mi sidas klarsence. Mi sekvas ĉion kvazaŭ kun kalkula kraĵono. Mi febras, miaj pulsoj frapas, mia koro batas, Korekta kaj bone disponita kriminalaĵo apartenas al la plej belaj kaj plej ekscitaj travivaĵoj de mia vivo. Kaj nun? La biletoj de tiu unua prezentado estas forvenditaj de post semajnoj. La biletprezoj kaŝe estas plialtiĝintaj ĝis la dekoblo, ĝis la dudekoblo. Mi devis pagi kapitalon por sidloko el la loĝio. Sed mi pagis. Ekscitite kun febrantaj nervoj mi eniris — iom malfrue — la rigardejon jam mallumigitan. Jus la kurteno levigis, kiam la loĝiservisto kondukis min al mia seĝo.

— Ĉu vi estas kontenta pri via seĝo, sinjoro?

— Jes, dankon.

— Ĉu mi deponu la ĉapelon en la vestejo?

— Ne, dankon.

Mi pensis, ke li iris. Li ne iris. Li restis staranta malantaŭ mia seĝo.

— Ĉu programon, se plaĉas al vi? li flustris.

— Ne, dankon.

— Ĝi estas kun bildoj.

— Ne, dankon.

— Sed eble binoklon, sinjoro?

Oni jam ludis. Mi sidis ekscitite kaj rezigne mansignis nervezo.

— Ĉu binoklon, se plaĉas al vi? ripetis la loĝiservisto.

— Ne, dankon!

Mi pensis, ke mi nun havos malĝenon. Mi ne havis!

— Ĉu la sinjoro deziras veturilon post la prezentado?

— Ne!!!

— Ĉu ne veturilon?

— Ne, ne!!!

— Sed eble nun iom da dolĉaĵo?

— Mi deziras nenion!

Mi estis kolerega. La teatraĵo komenciĝis tre ekscitige. Mi ne volis preterlasi ion.

— Ankaŭ ne ĉokoladon?

— Fulmo kaj tondro, ne!!!

— Aŭ eble kelke da keksoj?

— Nepre nenion! Iru al la diablo!

Fine ŝajnis, ke li komprenis, ke per mi li ne povos gajni monon. Kaj mi spertis la plej teruran venĝon de ĉagrenita loĝiisto, kies servojn mi ne akceptis. Li klinis sin profunden al mi kaj, montrante al la scenejo, siblis malame en mian orelon:

— La ĝardenisto estas la murdinto!

Jo Hanns Rösler  
Trad H. Koch

## Ne plu ridinde

Dum registaraj kunsidoj la registara prezidanto ofte kutimis fari ŝercojn, pri kiuj ĉiuj liaj konsilantoj ege ridis. Ĥufoje li konstatis, ke unu el la pli maljunaj konsilantoj restis serioza kaj muta dum ĉiuj ŝercoj.

Interesite la prezidanto demandis, ĉu sinjoro sekreta konsilanto fartas malbone, ĉar li estas tiel malbonhumora.

„Tute ne, sinjoro prezidanto“, la sekreta konsilanto respondis rive-rencante, „estas nur, ke mi ne bezonas plu ridi kun la aliaj sinjoroj, ĉar mi pensiiĝos jam venontan lundon!“

### Per la S. L. P.-Bulteno

mendu senkosten broŝuron kun klasika socia enhavo. Havebla en dekkvar lingvoj: germana, bulgara, franca, rusa, hispana kaj aliaj. Konatiĝu kun la Deleonismo! Bona libreto en la „Germana lingvo bulteno“ aperigas regule ĉiun duan monaton. Malmultekostaj libroj estas livereblaj (mi interkonsentas ankaŭ pri ne-mona ekvivalento). Mendu tuj ĉe:

Erwin Seligman  
237 E 88 St.  
New York 28

### ESPERANTO-KURIER Unabhängige deutsche Monatsschrift zur Verbreitung der Internationalen Sprache

Erscheint monatlich mit 12 Seiten.  
Einzelnummer — 40 DM. Halb-  
jahres-Abonnement 2.40 DM und  
30 Pfg. Zustellkosten.

VERLAG ESPERANTO-KURIER  
(16) Offenbach (Main), Schließfach 135  
Postcheck-Konto:  
Frankfurt (Main) 498 92

## Bewährtes Lehrmaterial

### ESPERANTO-SCHNELLKURS

von Hans Koch  
52 S., kart., DM 1.—

### DAS ESPERANTO-EXAMEN

von Hans Koch  
16 S., DM 0.40

### WÖRTERBUCH D/E—E/D

von Hermann Wagner  
201 S., geb. DM 2.—

### WÖRTERBUCH E/D

Sehr ausführlich, 11 000 Stichwörter  
von Butin und Sommer  
244 S., geb. DM 9.—

### TASCHENWÖRTERBUCH D/E

Sehr ausführlich, 13 000 Stichwörter  
von Josef Kühnel  
192 S., kart., DM 0.90

### ESPERANTO

FÜR FORTGESCHRITTENE  
von Studienrat Georg Streidt  
77 S., kart., DM 2.—

### GRUNDSÄTZE DES FREMD- SPRACHENUNTERRICHTS

Für Esperanto-Kursleiter  
52 S., kart., DM 2.75

### NONI KAJ MANI

Erzählung in leichtem Esperanto  
von Jon Svensson  
159 S., kart., DM 2.20

Bestellen Sie bei Ihrem

## Esperanto-Kurier

(16) Offenbach (Main)

Schließfach 135

Postcheck-Konto Ffm. 498 92

## Postkarten

mit dem Bildnis unseres verehrten Meisters Dr. L. L. Zamenhof auf schönem weißem Kunst-druckkarton in vornehmer grau-grüner Wiedergabe. Einzelpreis DM 0.30.

Bezugspreise für Gruppen  
und Wiederverkäufer:

10 Stück DM 2.80  
25 Stück DM 6.25  
50 Stück DM 11.—  
100 Stück DM 20.—





plus Porto gegen Voreinsendung oder Nachnahme. Bei größeren Bestellungen weiterer Rabatt und portofreie Lieferung!

PAUL SCHMIDT

Bildpostkarten- und Exlibris-  
Verlag  
(17a) Mannheim, Am Meßplatz 1

# La diversspeca glitveturilo

Patro kaj filo ĉiam scias solvon



W. G. 49

## Sorto de Reĝino

(daŭrigo de paĝo 8)

„Karulino — nun atendas vin granda perdo. Anstataŭ ĝui plu la varman sunluman, vi estos enkarcerigita en malvasta volbo, kiu malebligas vin, fari eĉ la plej malgrandan movon. Vi devas rezigni estonte la ĉiujaran periodon de la amo, la aspiron al la amato kaj la feliĉigan trovon, la konstruon de

la hejmo kaj ĉiun feliĉecon kunligitan kun tiu ĉi travivaĵo. Sed anstataŭ tio vi fariĝos gravega kaj mirinda estaĵo, laŭŝajne nemovebla kaj senforma maso, vivanta subterigite, sed efektive la sola sentema origino, la sentado, pensado, vidado de vivo, kiu estas milfoje pli granda kaj grava, ol via malgranda estaĵo povus iam ajn fariĝi. Kaj krom tio mi volas doni al vi mian protekton.“

Oni povas kompreni, kial la reĝino estas kondamnata je senmoveco kaj enfermata en ĉelo. Tial ke ŝi estas la cerbo de la tuta organizajo, ŝi devas esti necese ligita al difinita loko. La reĝino de la termitoj neniam endanĝeriĝos, post kiam la ŝtato estas fondita kaj la reĝino senmoviĝinta.

Trad. M. Reitberger  
el „La animo de la blanka formiko“